# Usona Mozaiko

Kutime la laboristaj sindikatoj okupas sin pri salajroj kaj laborkondiĉoj. Sed en aeroplana fabriko apud Burbank, Kalifornio, la sindikato de l' mekanikistoj devas debati pri longeco de la mondfama minijupo. Lana Uinters, laŭ ŝia kontrolistino, portis jupon kiu montras tro multe la femuron kaj ordonis, ke ŝi iru hejmen por surmeti alian jupon, kiu montras nur la kruron. Sed Lana plendis al sia sindikatestro, kiu havigis al ŝi, post diskuto kun la administracio, la rajton konservi la kritikitan vestaĵon. Foto evidentigis, ke ŝia jupo staras nur 55 centimetrojn alte. Laŭ la skalo de l'monda modo tiu alteco estas vere tre modesta.

Ni vivas en epoko de tujpreta kafo, de tujpreta amo, de tujpreta kompreno, kaj multe pli ol virinaj femuroj senkaŝe evidentiĝas. En teatro, libroj, ĵurnaloj, televido ktp ĉio publike kaj senkaŝe estas diskutata: edziĝnokto, ĉiaj seksrilatoj, urinado, intest-evakuo kaj aliaj aventuroj en la necesejo, eskapdrogoj, samseks-amo, mamoj videblaj en restoracio k.s. La popularaj romanoj enhavas devige adulton aŭ murdon por satigi la leganton. Ĝis nun almenaŭ la verkistoj ne detale pritraktas masturbon, menstruon kaj hemorojdojn. La serĉo por pli kaj pli freŝa sensacio espereble iam renversiĝos, kaj eble tiel menso kiel mamoj denove ricevos konvenan atenton.

★

Ĝis verkado de tiuj ĉi linioj la policanoj ne arestis la murdinton al Marteno Lutero King. Lia ĉefa helpinto, pastro Ralf D. Abernati, komencis tiumomente la Marŝadon de la Malriĉuloj por pace protesti en Vaŝingtono. Li jam urĝis la federal-parlamentanojn voĉdoni sufiĉe atentindan subvencion por provizi nutraĵon, loĝejojn kaj okupojn por du milionoj da individuoj. La Unuan de Majo komenciĝis la marŝo en la urbo Memfiso, kie King estis murdita en aprilo 1968.

En kelkaj distriktoj oni rekonstruas la domaĉojn kaj batalas kontraŭ rasismon. Aliloke la fantomo estas „backlash" (t.e. returnfrapa) de kelkaj reakciaj blankuloj timigitaj kaj sinvenĝaj pro la ribeloj en la grandaj urboj.

Ne forgesu ke en Usono ekzistis ĉiam diverstavola proletaro neniam komplete unuiĝinta. Ankaŭ la lando kreskas rapidege kiel kontinento kaj logis al si anojn el tutmondo. Analfabetecon oni atendas inter homoj elradikigitaj, kiuj en nova lando devas protekti sin senpere per pafilo kaj „gard-atenta komitato". Malsukceso post altaj esperoj je riĉiĝo kaj venko kreas etoson por perforto. Epizodoj de konfliktoj markis la historion de Usono. Kiel sekvo de la postmilita renverso en Ĉinio naskiĝis la timiga atako de senatano M'Karto kontraŭ „komunismo" (interna kaj ekstera, kiel kaŭzo de perfido en horo de sukceso). La jaron 1967 karakterizis krom krizo en Vjetnamio ribeloj en ĉefaj usonaj urboj. La ekstremuloj, kiuj bruas pri „nigra potenco" kaj proponas nigran rasismon, elvokos, laŭ la pli saĝaj negroj mem (ekz. Bajard Rustin, kiu subskribis la proponon de UEA al UNO), kruelan reakcian subpremon al la tuta negra popolaro.

Escepte de la konstru-industrio estas malfacile trovi okupojn, ĉar la aŭtomatigo de servoj kaj industrioj detruas pli kaj pli la nekvalifikitajn okupojn, kiujn plenumis la negro. La kamparanoj el la Sudo tial amasiĝis en la urboj. Estinte la riĉaj korporacioj ricevis subvenciojn, kaj la Bonfara Ŝtato ĉefe helpas la riĉulojn. Socialismo por antaŭurboj, ne por la malnovaj urboj de la ordinaraj laboristoj. Eĉ eksprezidanto Ejsenhaŭer proponis en la vaste disvastigata „Readers' Digest" la planatan konstruon de Nov-urboj; kaj Nikson, nun plej fama kandidato por la Respublikana Partio, ankaŭ favoras registaran elspezon por anstataŭigi la domaĉojn.

Kredante kaj fidante, ke la homaro kaj ĝia civilizacio antaŭeniras spite de la nuntempaj militoj kaj krizoj, progresemuloj en Usono kalkulas en la nuna politika

konflikto starigi novan politikan koalicion esperoplenan. Jam ses kandidatoj por anstataŭi la rezignantan prezidanton Ĝonson interbatalas ĉi-printempe, kvankam la balotado estis fiksita por novembro. Jam la Pekina registaro estis invitita sendi oficialajn observantojn. Defilis ĝis nun kiel kandidatoj por la plej grava kaj influhava ŝtata ofico elektata sur la tero kun demokrata etiketo: M'Karti, Humphrey kaj R. F. K. Kennedi, mortigita intertempe same kiel lia frato. Laŭdinde senatano M'Karto rompis la hipnotostaton kaj malvenko-senton rilate la publikan proteston kontraŭ la milito en Vjetnamio. Junuloj tre admiras lin, kaj li vere plenigas iom la breĉon inter la 35-jaruloj kaj la pli juna generacio, — ĉiamaniere nekonformisma.

Kelkaj el la „hipioj" forrazis siajn barbojn kaj fortranĉis la densan hararon, denove uzante sapon por influi voĉdonadon en la prov-elektoj de kandidato en diversaj ŝtatoj, sub la devizo „Clean for Gene". Ju pli bonvena, des pli necesa estis reciproka interkompreno inter junuloj kaj plenaĝuloj por savi Usonon.

Respublikan-partiaj kandidatoj nomiĝis Nikson, iama vicprezidanto, kaj Rockefeller, nuna guberniestro de l'ŝtato Novjorko. Pli progresema ol Nikson, la due nomita akiras subtenon ekster sia partio en la kazo se li fariĝos oficiala kandidato en Miamo, kie kunsidos la partio.

Sendependa rasisto, danĝera faŝisto estas Wallace el suda reakcia ŝtato Alabama, kiu kolektos la voĉojn de la kontraŭnegruloj kaj de la homoj timigitaj de ribeloj kaj perfortaj ekstremuloj. Fakte iuj el tiu juna ekstrema grupo opinias, ke ilia malpacienco similas revolucian fervoron kaj kapablon. Kelkaj el tiuj ekstremuloj intermiksas sian admiron por la Maŭ-Maŭoj en Orienta Afriko kun Maŭ-Zedong en Ĉinio. Sed plejparte la negroj, kiuj plej severe suferas pro malriĉeco, kaj aliaj protestantoj kune marŝas kaj manifestacias pace kaj uzos siajn politikajn rajtojn dum balota periodo. Ili kontraŭstaras nihilismon kaj ĉiakoloran rasismon.

Usono ekipita per senprecedenca produktiveco povus produkti „buteron **kaj** pafilojn", sed la Federala Kongreso rifuzas pluan elspezon (eĉ limigas) por civila butero, dum la milito multekosta en Vjetnamio daŭras. Tial la protestoj de la reformistoj kontraŭ la milito kreskas. Inter la gravaj junaj verkistoj usonaj estas Majkel Harrington kaj lia freŝdata libro „Toward a Democratic Left" (Al Demokrata Maldekstro) montras per oficialaj statistikoj kaj citoj el kapitalistaj revuoj, ke Usono suferos katastrofan krizon sen socialist-kolektivaj rimedoj por solvi siajn problemojn. Li asertas, ke ne sufiĉnombraj estas la malriĉuloj, negroj kaj laboristoj por trafi politikan venkon sen helpo de la influhavaj intelektuloj, studentoj, profesoroj, teknikistoj, administrantoj en ambaŭ, la publika kaj privata sektoroj de la usona komunumo. La negraj organizoj, kiuj nun registras siajn anojn por voĉdoni pli efektive; la laborist-sindikatoj, kiuj nun provizas la stabanojn de la registaro kaj la instruistojn, kiuj ne plu snobisme malakceptas la organizon, kaj ĉia liberala grupo kune starigu Novan Koalicion similan al Rusvelta sukceso antaŭ 35 jaroj. Oni elspezu publikan monon nur por socia celo. Planu novajn urbojn kaj konstruu ses milionojn da domoj en venontaj kvin jaroj. Planu regionojn por industrio, transportado, edukado, kaj moderna prizorgo de sano, ludo kaj laboro. Vera protekto por la konsumantoj kaj antaŭenpaŝo al reala egaleco — jen la celoj!

Tiu Nova Koalicio per venko forpuŝas reakcion propralande kaj helpas ekonomie demokratajn landojn ekstere, laŭbezone en Azio, Afriko kaj Suda Ameriko. Jam vicprezidanto Humphrey parolas pri amikaj rilatoj kun Ruĝa Ĉinio. Laŭ Harrington ni devas agnoski ŝanĝon en la sinteno de la komunistaj ŝtatoj, disdoni helpon nur al progresemaj landoj kaj prefere per UNO. Li ne volas nomi siajn planojn socialismo, sed li certe devas utiligi la sindonemon kaj idealismon de la fruaj socialistoj kiel impulso por realigi sian planaron kaj unue venki en balotado.

### Faktoroj en Homa Evoluado

Marks emfazis la forton de ekonomiaj

faktoroj. Freŭd substrekis la povon de la sekspremoj. Nun en sia verko „Teritoria Imperativo" (Atheneum, 1966, 390 pp.), Rodberto Ardrey insistas, ke la baza faktoro estas la batalo por defendi la loĝvivlokon kaj distrikton. Laŭ li ankoraŭ funkcias forte tiu ĉi instinkto. Kial Britio senespere kaj ŝajne sensaĝe batalis kontraŭ Hitler post disfalo de Francio? Kial malgranda Finnlando rezistis la rusan giganton? Kial la trupoj de Hitler ne venkis Sovetion? Kial dividita Usono unuiĝis, kiam Japanio atakis en j. 1941? Kiel kaj kial Vjetnamio sukcese kontraŭstaris la potencon de Francio kaj poste de Usono?

La aŭtoro respondas: la forta instinkto defendi propran hejmlandon. Li donas ankaŭ sennombrajn ekzemplojn el la biologia mondo — pri birdoj, insektoj, bestoj grandaj kaj male, krom el homa historio. Ĉiuokaze estas unuiĝo por repeli atakon. Kredeble en la lando de mia leganto tiu ĉi verko angle aŭ tradukite ankaŭ jam aperis. La spertuloj furioze argumentas, kiel ili faris, kiam Darvin prezentis sian teorion pri natura selektado antaŭ jarcento. Sed Ardrey verkas tre alloge pri la evoluo de la homo kaj lia socio. Fine, kiel la teorio rilatas al la filozofio de nia pioniro Lanti? Supozeble, se la viroj el Marso atakus nian planedon, ni mondanoj fine unuiĝus per helpo de Esperanto por detrui la invadon!

Persona alvoko: Legantoj, kies parencoj nun loĝas en Usono, skribu klarigojn al ili. Ofte bedaŭre la enmigrantoj tie ĉi forgesis kaj pri Esperanto kaj pri junaj idealoj. Ofte la blanka enmigranto iom sukcesanta, estas tiu kiu kontraŭbatalas la rajton de negroj loĝi laŭplaĉe kaj labori egalrajte. La rezulto de la nuna konflikto tie ĉi povos influi la historion de la tutmondo. Vi povas helpi.

### Komento pri 50-a datreveno de Sovetia Revolucio

Nur ŝanĝiĝo daŭras eterne. Kiam mi legas la inundon de artikoloj kaj novaj verkoj, kiuj analizas (ofte simpatie) la Revolucion en j. 1917, trafluas mian memoron la inspiro kaj esperego, kiuj fulmis la senluman horizonton de la Unua Mondmilito. Kiel la poeto deklamis pri la Franca Revolucio: „Bone en tiu sunleviĝo vivi kaj esti juna signifis ĝui realan ĉielon!" Por juna karbministo en Suda Kimrio estis neforgesebla sperto, kaj mi ne kontentiĝis, ĝis mi vizitis Sovetion okaze de SAT-Kongreso en j. 1926. Eble pli bone ami kaj perdi ol neniam ami iel.

Nun mi legas la komenton de la tre miksita grupo usona nomita „La Nova Maldekstra" (angle, New Left). Staughton Lynd, unu el tiu grupo, mondfama kiel pacisto, kiu defie vizitis Hanojon, en kolekto de eseoj deklaris, ke li koleris, ĉar la sovetiaj estroj ne volas „riski la ekziston de sia lando por la atingo kaj celo de internacia revolucia solidareco." Laŭ li Sovetio estas „la plej malesperiga fakto en la politika mondo." Ŝajne por tiaj novaj maldekstruloj nuntempe ne Moskvo sed Pekino estas la signalfajro de espero. Por la neinformitaj optimistoj ni citu la rusan proverbon: „Neniu estas tiom brava kiom blinda ĉevalo." Aliaj tagoj portas aliajn ideojn. Estas pli feliĉige veturi ol atingi la finpunkton, — estas la saĝeco nur de maljunuloj.

### Kresko en moderna komunikado

| | en jaro 1961 | en jaro 1966 |
|---|---|---|
| Nacioj kiuj havas televidon | 64 | 104 |
| T.V. aparatoj | 101.000.000 | 182.000.000 |
| Radio-riceviloj | 356.000.000 | 543.000.000 |
| Horoj uzataj por disaŭdigo ĉiusemajne | 16.000 | 24.000 |

Nun en Hindio oni konstruas vilaĝricevilojn por edukada celo.

### Pri UNO

Ankoraŭ funkcias en Novjorko modesta elmontrejo kaj malgranda ĉiusemajna Esperanto-kurso por UNO-funkciuloj, — tre malgranda kompare kun la kursoj en la oficialaj lingvoj, kies akiro alportas krediton kaj pli bonan salajron. Notoj pri la internacia lingvo regule aperas en la „Secretariat" (monata organo por funkciuloj). UEA kaj la Novjorka Klubo listiĝas en la oficiala „Newsletter" kiel kunlaborantaj neregistaraj organizoj por celebri la 20-an datrevenon de la Deklaro de Homaj Rajtoj. Kvankam laŭvorte la usona registaro oficiale benas la Deklaron, ĝi ne ratifis ĝis nun la konvenciojn krom tiu pri homsklaveco. Nur kiam specifa konfirmo okazos, la konvencio fariĝos laŭleĝe deviga. Artikolo dua el la Universala Deklaro enhavas la solan mencion pri lingva diferencigo jene:

> „Ĉiuj rajtoj kaj liberoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, **lingvo**, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedajoj aŭ alia stato." (Substreko mia)

Pasante oni povas noti, ke UNO mem en Novjorko akceptas leterojn en la internacia lingvo, kaj la estro de la Esperanta Klubo tradukas kaj respondas por la koncerna instanco. El 123 UNO-anoj nur 8 rifuzis konfirmi iun ajn konvencion, sed Usono ratifis unu fine de decembro 1967. Pri genocido korpe kaj kulture Usono silentas, dum 71 membroj aprobis. Simile pri deviga laboro kaj rajtoj politikaj de virinoj ktp., kvankam kelkaj el la konvencioj estis senditaj al la Senato antaŭ 19 jaroj. Ĉefe la leĝistoj kontraŭstaras, argumentante ke la aferoj kuŝas sub la jurisdikcio de la apartaj lokaj memregaj 50 ŝtatoj aŭ.... ke tiaj konvencioj ne estas bezonataj en Usono. Notu ankaŭ, ke ĝis nun Usono ne akceptas devige la Tutmondan Tribunalon en Hago.

Rilate al ĉiu nacio UNO povas uzi nur publikan opinion, ĉar mankas al ĝi kontrolistoj, kaj kelkaj landoj nur teorie akceptas la Ĉarton. Homoj ankoraŭ vendiĝas kiel bestoj en kelkaj landoj. Individuo ne rajtas apeli senpere al UNO, kiu pritraktas nur plendojn pere de nacioj, kaj satire oni devas ankoraŭ paroli pri Unuiĝontaj Nacioj. Kion fari? Tre malrapide la nacioj povas „kutimiĝi al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo". La plej disvendata Novjorka ĉiutaga ĵurnalo, **Daily News** (dimanĉa disvendo pli ol 3 milionoj da ekz-oj) reakcie daŭre postulas: Forprenu Usonon el UNO kaj UNO-n el Usono"; ĝi ofte klopodas haltigi la monan subtenon.

Nuntempe ĉe UNO-asembleo 20 nacioj proponas, ke UNO akceptu traktaton por haltigi la disvastigon de nuklearaj batalilojn. Sovetio, Britio kaj Usono konsentas pri ĝi kaj promesis helpi agrese atakotajn naciojn, kiuj ne havas tiajn batalilojn. Sed Francio kaj Ruĝa Ĉinio bojkotis la negocadon, ĉar ili pretende suspektas komploton. Ĝis nun neniu nacio el Afriko kaj Latin-Ameriko kaj nur Mongolio el Azio deklaras sin favore al la traktato. Intertempe la produkto de atombomboj atingos (en j. 1980) pli ol 15.000 jare. Ĉu la homo imitos la lemingon? *)

### Lingvaj dividoj kaj bataloj

Niaj ĵurnaloj konstante dum printempo 1968 raportis pri lingvaj dividoj de Hindio ĝis Kebeko en Kanadio. Tie la nova ĉefministro, Trudeaŭ, parolante france-angle, penas ŝtopi la breĉon. En Belgio la flandra kaj franca lingvoj kaŭzis politikan krizon en aprilo. En Jugoslavio la kroatoj volas havi sian propran lingvon. La Filipinoj ne ŝatas alilandajn lingvojn kaj volas uzi sian tagalogon. Ni aŭdis pri protestoj kontraŭ la angla en Hindio, norde kaj sude. Studentoj en Kimrio protestas kontraŭ neuzo de sia enlanda kimra lingvo. En Novjorko enmigrantoj postulas hispanajn kursojn, kaj eĉ unuope aranĝiĝas kursoj en sŭahilio kaj haŭzao (nur du el 800

*) Skandinavia rodulo.

afrikaj lingvoj) pro tribaj prestiĝmotivoj. Konata revuo **Saturday Review** (la 6-an de aprilo 1968) enhavis gravan artikolon de la fama lingvisto d-ro Mario Pei: „La Ribelo Kontraŭ Angla", kiu elvokis komenton.

Ĉu Esperanto estas tro racia kaj nenacia en neracia mondo por solvi tiajn konflfiktojn? Ĉu ni speciale en la Jaro de 20-a Naskiĝtago de Deklaracio de Homaj Rajtoj pli efektive penas forpuŝi lingvan apartigon per nia planita internacia lingvo? **).

*488 (L. I. C., Usono)*

*En printempo 1968*

---

**) Se iu SAT-ano deziras ricevi la artikolon „Ĉu la angla taŭgas kiel mondlingvo?", skribu al la verkinto: *M. Starr*, 3940-47th St., *Long Island City*, N.Y., 11104.

# Laŭ mia ..... Ridpunkto

Se mi ne eraras, oni legas ie ĉe Ezopo, aŭ ĉe alia, ke la ŝtatoj, pro sia interna organizo, estas kompareblaj kun la homa korpo. Ke ĉiu ŝtato havas kapon, tion oni scias. Ankaŭ tion, ke certaj ĝiaj membroj estas sufiĉe laborkapablaj por provizi nutraĵon al la tuto. Simile, aliaj membroj aŭ organoj plenumas aliajn taskojn: La Fisko, ekzemple, reprezentas la stomakon; la okuloj estas la Polico, la buŝo la Parlamento, kaj vi povas daŭrigi la ludon, se plaĉas. Tiel do, ankaŭ en la ŝtatoj estas prizorgataj ĉiuj bezonoj propraj al la homa aparato, kaj resume tio signifas, ke al ĉiuj necesaj funkcioj en la homa korpo respondas en la ŝtato same necesaj funkciuloj. Estas do memkompreneble, ke en la ŝtatoj ne ĉio montriĝas perfekta, ĉar ja ankaŭ la krono de l'kreaĵoj ne estas perfekta. La homa maŝino havas kelkajn fabrikdifektojn. Pensu nur pri aktiva nazkataro! Ĝi eruptas sendepende de nia volo, verŝajne nur pro nesufiĉa kapablo de iu malfeliĉa membrano. Ĝi estas vere malfeliĉa, tiu membrano, unue en la homo, ĉar tie ĝi oficas kiel mukoproduktanto, kio estis neniam komplimento, nek honorinda okupo, kaj, due, malfeliĉa ankaŭ en la ŝtato, ĉar tie ĝi estas duoble impostata. Jes, sinjoro! Kiel membro, kaj kiel ano. Pleonasmo estas lukso. — Alia difekto — kaj rimarku, ke ni restas nur ĉe la supraj etaĝoj — alia difekto estas la fatalaj dentodoloroj. Ĉiu homo, iam aŭ tiam, sed neeviteble, grimacas pro ili. Same la ŝtatoj. Ŝajnas, ke ankaŭ ili, ĝuste nun, suferas pro akutaj stu..dentodoloroj. Ho, certe, konsentite — aŭ kohnbendite— oni povas tiupunkte riproĉi al la ŝtatoj troan neglekton de elementaj sanecprincipoj. La simptomoj anoncantaj la studentodolorojn estis ja delonge evidentaj. Nu, kial oni ne konsultis tuj kompetentan evidentiston? Jam delonge, pli aŭ malpli arde, la studentoj mem petis, petegis aplikon de pli racia